

"La vero estas nia mastro, ne ni regas la veron."
Mihai EMINESCU

BAZARO

Esperantlingva revuo, Cluj-Napoca, Jaro II, Numero 1 (4)
1998, Printempo



ISSN 1453-7478

ABONO !

La abono por la sekvanta numero de BAZARO por Rumanianoj estas 2.500 leoj aŭ egalvaloro en poŝtmarkoj kaj por eksterlandanoj 1 IRK.

La abonon bonvolu sendi al jenaj adresoj:

C.P.1111. RO-3400 CLUJ-NAPOCA por KOLOZSVÁRI Zolt aŭ

C.P.200. RO-3400 CLUJ-NAPOCA SIGMOND Júlia

Ni akceptos donacojn, subtenojn kaj varbas distribuantojn por nia gazeto!

Dankon, La red.

ALVOKO !

BAZARO intencas aperigi la liston de Rumaniaj geesperantistoj jam komence de 1998, tiucele bonvolu sendi urĝe viajn datumojn ĝis la fino de 1997, ĉar alikaze pro manko de sufiĉaj datumoj ni ne povas aperigi ĝin.

Personoj enlistigitaj havos nenian devon, ekzemple gastigi aliajn esperantistojn, loĝigi aŭ helpi ilin. Tiu listo servos nur kiel adresaro kaj dokumento pri la nombro kaj loĝloko de geesperantistoj en Rumanio.

Tiucele mi petas vin fotokopii la jenan formularon, disdonu ĝin inter la geesperantistoj de via klubo aŭ urbo kaj plenigite resendu al ni. Vi povas nur simple skribi sur blanka papero la datumojn petatajn de la formularo kaj sendi ĝin al la redakcio.

Familia nomo:

Naskiĝdato:

Adreso:

Urbo/vilaĝo:

Telefono:

Laŭdezire vi povas malpleni ĝi unu aŭ pli da rubrikoj, pri kiuj vi opinias, ke ĝi restu "sekreto".

Persona nomo:

Sekso: vir/aŭ virina

Poŝtkodo:

Profesio:

Bildkart-ekspozicion pri la plej belaj preĝejoj de la mondo organizas SIGMOND Júlia, 3400 Cluj-Napoca, C.P.200.
BONVOLU KONTRIBUI! (eble pruntedoni)

Redakcio:

ASOCIATIA de ESPERANTO CLUJ
RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111 RUMANIO

Eldonoro:

Eldonaro DOKIA
P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca,
RUMANIO kaj
MUNICIPAL KULTURDOMO
P-ta Urani nr. 24
RO-3400, Cluj-Napoca, RUMANIO

Redakcia komitato:

Radu CRETU, SIGMOND Júlia, KOLOZSVÁRI
Zolt

Aperas: kvaronjare

Redakcia:

ASOCIATIA de ESPERANTO CLUJ
RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111 ROMANIA

Ĉeflata de:

Ĉeflata DOKIA
P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca,
ROMANIA ĉi
CASA MUNICIPALA de CULTURA
P-ta Urani nr. 24
RO-3400, Cluj-Napoca, ROMANIA

Comisia de redactie:

Radu CRETU, SIGMOND Júlia, KOLOZSVÁRI
Zolt

Apare: trimestrial.

OMAĜE AL Mihai EMINESCU

Mihai EMINESCU estas la plej granda kaj la plej fama rumana verkisto (poeto), pere de lia verkaro rumana literaturo atingis la apogeon de sia artista matureco kaj eniris por ĉiam en la panteonon de la universala literaturo flanke de aliaj verkoj de la homaro.

Laŭ la tradicio de la rumana romantikaj verkistoj de 1848, EMINESCU iĝis granda romantika poeto de la rumana literaturo, kaj lasta romantika poeto de la universala literaturo (laŭ la opinio de la literatura kritiko).

Mihai EMINESCU naskiĝis je la 15-an de januaro 1850 en norda Moldavio. Lia patro Gheorghe EMINOVICI apartenis al malnova kamparana familio de la distrikto Suceava kaj havis malgrandan heredaĵon.

Tie Mihai travivis sian knabecon, kaj estis impresita de mirinda naturo de Ipotești kaj de rumana folkloro. Li ofte promenis tra la grandaj arbaroj, sidis sur la bordo de riveretoj, aŭskultis la belan kanton de diversaj birdoj. Tre profunde impresis lin la rakontoj de maljunuloj, la popolaj legendoj kaj fabeloj en kiu historiaj faktoj estis intermiksitaj kun imagitaj mirindaĵoj.

Eminescu studis en Cernăuți. Estis la tempo kiam li multe legis, precipe literaturajn kaj historiajn verkojn, kiam li kreis sian unuan poeziaĵon post la morto de lia kara profesoro Aron Pumnul. La unua eldonita poezio nomita "Se mi havus..." aperis en la revuo "La Familio" en la urbo Oradea. La redaktoro de ĉi tiu revuo ŝanĝis la nomon al Eminescu (li nomiĝis ĝis tiam Eminovici).

Teatro ĉiam impresis la junan Eminescu-n. Kiam teatra trupo vizitis la urbon Cernăuți, Eminescu forlasis lernejon kaj vizitadis kune kun ĝi diversajn urbojn de la lando: Brașovo-n, Sibiu-n, Timișoara-n, Arad-on kaj Lugoj-on. Tiu periodo estis tre grava por la formado de estonta poeto, ĉar li konis la vivon de nia popolo, la kutimojn, la folklorojn.

En 1869 M. EMINESCU vojaĝis al Vieno por studi. Tie li konatiĝis kun rumana gestudentoj (inter ili Ioan SLAVICI), kaj fariĝis membro de Junulara Rumana Societo.

Post du jaroj li vojaĝis al Berlino por daŭrigi siajn studojn.

En 1874 Eminescu revenis al Rumanio, kaj laboris en la urbo Iași, poste en Bukareŝto. Lia vivo estis tre malfacila, mizera, malriĉa kaj malfeliĉa.

Tio detruis la sanon de la poeto. En 1883 li malsaniĝis, kaj 1889 li mortis en Bukareŝto.

En la lasta periodo li kreis siajn majstroverkojn: "Deziro", "La lago", "Vesperstelo", "La Leteroj".

Eminescu verkis ankaŭ prozon, li estas la aŭtoro de famaj filozofiaj kaj fantastikaj noveloj, romanoj, historiaj teatraĵoj.

Florica POPA, TIMISOARA

La fontoj de tiu neordinara kreanto estis la filozofio, historio kaj amo. La unuaj tri poemoj kiujn Eminescu sendis al "Junimea" en Iași, respegulas tiujn fontojn kaj situigis la rumanan literaturon en la plej alta nivelo de la tiama Eŭropa artkreado: "Epigonoj" (la historio kiel ero de nacia kulturo), "Mortua est" (la amdramo), "Venuso kaj Madono" (filozofiaj fontoj). Reveninte de Vieno kaj Berlino al Iași, Eminescu reprenis la kontakton kun la vilaĝo, kaj aldonis aliajn kreofontojn: la naturon kaj folkloron. Tion oni povas konstati en la poemoj "Calin", "Soleco", "Sonetoj", "Leteroj" kaj precipe en sia superega kreaĵo "Vesperstelo"; poemo kiu estas plena esprimo de la poeziaj penso kaj arto de la granda eŭropa lirikisto. Alain Guillermon, en "La genése intérieure des poésies de Eminescu" (1963) rimarkis ke "la lirika kulmino de la rumana literaturo estis ĝuste la lasta verko de Eminescu, la plej ŝarĝita de pensado kaj emocio".

Pensadon kaj emociion liveris al la poeto ankaŭ la naturo: la praarbo, la lago, la vesperiĝo super la vilaĝo, la senfina melankolio de la marbordo kun la eterna ruliĝo de ondoj. La naturo kaj la amo kunfleksigis kaj, post longa ellaborado, konsistigis la ĉefverkojn: "Sur la sama eta strato", "Ho, panjo", "Preter la poploj sen kompar", "Venecio", "Kial vi arbar' luliĝas?".

Gh. Bulgar en la revuo "Rumanaj ferioj" (1983) asertis: "Per la tema riĉeco, per la profundeco de la medito, kaj per la senkompara forto de sia lirikismo, trovinta ĉiam subtilan vortumon de la poezia esprimo, kiu kristaligas mirakle konscio-statojn de la ĉiama homo, sed antaŭ ĉio de siaj similuloj en ĉi tiu historia kaj geografia, karpat-danuba spaco, Eminescu enkorpigis la genion de la rumana lingvo kaj popolo tiei, ke ni ĉiuj rekonas en li aŭtentan heroldon de la rumana spiriteco, antaŭvidanton kaj malfermanton de vojoj por la daŭra pliigo de valoroj de la nacia kulturo."

Aurora BUTE, TIMIȘOARA

El la pensoj de Eminescu

- Ĝis kiam vi estas feliĉa - vi nombros aron de amikoj. Kiam malbeliĝos la tempoj - sola vi restos!

- La edukado estas karakterkulturo, la kulturo estas mens edukado.

Trans la pintoj

de Mihai EMINESCU

Trans la pintoj pasas lun'
Vento tintas tint-tint-tinte,
Tra aluaj branĉetoj-nun
Sonas la korn' melankolie.

Malproksime, malproksime,
Pli mallaŭte, pli mallaŭte,
Dolĉinte per marta sopir'
Mia senkares' animzefir'.

Ĉu vi silentas kiam sorĉita
Mia koro al vi estus turnita?
Ĉu vi eĉ sonas, dolĉa korn'
Por miã fora bel-sezon'?

Nur la poeto

de Mihai EMINESCU

Nur la poeto,
Tiel kiel flugantaj birdoj
Super la ondoj,
Trapasas tempenslimon.
En pensbranĉoj,
En sanktarbaretoj,
Tie kie birdoj, same al li,
Sin superigas kantante.

elrumanigitaj
de Maria SECULA
TIMIȘCARA

Omãge al PETŐFI Sándor

Petőfi Sándor naskiĝis la 1-an de januaro 1823, falis en la batalo ĉe Sighișoara (Segesvár) la 31-an de julio 1849. Lia patro PETROVICS István, nobelo, lia patrino HRUZ Maria, slovaka servistino estis.

La vivo-vojon de Petőfi, oni komparas al kometo. Li havis tre mallongan vivon, sed kiel linkisto, li levis sur la plej altan nivelon la grandan tendencon de tiama Eŭropa poezio: la lirikan realismon.

Kiam Petőfi elpaŝis, jam pretendo tutnacia estis liberiĝi el sub pli ol tri-jarcenta Habsburga premo. Liaj poemoj de la lasta triono de sia poezio estas brilaj pruvoj pri klarvido kaj celkonscio de revoluciulo. Per liaj poemoj la signifo de la nacia kaj ĝenerala socia progreso ensorbiĝis, laŭ sia plej moderna senco, en la publikan konseion.

Eble lia plej konata verko estas epopeo "Johano la Brava", kiu estis tradukita de oriento ĝis okcidento. Cetere el pli ol 700 poemoj de Petőfi naskiĝis pli ol 33.000 tradukoj en ĉirkaŭ 55 lingvoj.

La unua esperanta versio de "Johano la Brava" aperis en 1923, cent jarojn post la naskiĝo de Petőfi. La traduko de KALOCSAY Kálmán perfekte redonas en formo de versa popolfabelo, kun senmanka gracio, naiva ĉarmo, suka vervo la aventurojn jen realajn, jen miraklajn de juna ŝafisto. Menciindas ke al la ĉina lingvo oni tradukis ĝin laŭ la esperanta traduko.

Sed li ankaŭ tradukis, ekz. Shakespeare-dramon (Korjolino), la romanon Robin Hood, poemojn de Shelley, de Moore, de Béranger, de Moreau, de Heine kaj de Schiller.

Lia propra aventura sorto, liaj amoj, la fervora adoro, kiun li dediĉis al la patrino, al la edzino, al la infano, trovas ĉe li la plej kortuŝan esprimon.

Malfacila estas elekti el liaj poemoj la plej taŭgan, kiu povus plej bone karakterizi lin.

SIGMOND Júlia, CLUJ

La amo kaj liber'

de PETŐFI Sándor

La amo kaj liber':
 plej karaj sur ia ter!
 Mi por mia am' oferas
 vivoflamon,
 mi por la liber' oferas
 mian amon.

Trad. KALOCSAY Kálmán

Constantin I. ISTRATI (1850-1918)

rumana scienculo, kuracisto kaj pioniro de Esperanto movado
 en Rumanio

Constantin I. ISTRATI (pr. Konstantin I. ISTRATI), la mondfama kemiisto kaj kuracisto estis unu el la pioniroj de la Esperanto-movado en Rumanio je la komenco de nia jarcento. En 1908 j. li estis elektita enkadre de la Rumana Federacio de Esperantistaj Societoj, kiel honora prezidanto. Constantin I. ISTRATI estis membro kaj pli poste ankaŭ prezidanto de la Rumana Scienca Akademio, profesoro kaj fondinto de la rumana organika kemia skolo enkadre de Universitato Bukareŝto (Rumanio). Samtempe li estis honora membro de la pli multaj fremdiandaj, sciencaj societoj.

La Rumana Federacio de Esperantistaj Societoj agadis en urbo Galați (pr. Galac) kaj la tiama estro estis la elstara pioniro de nialanda E-movado H. FISCHER-GALATI. Constantin I. ISTRATI estis fervora apoganto de nia zamenhofa ideo. Lian opinion pri Esperanto esprimis ankaŭ en la antaŭparolo de la lernolibro de d-ro Saul KIMEL. Li skribis je la 30-an de aprilo 1909 inter aliaj la jenajn vortojn: "Ni devas ĉiuj samtempe lerni Esperanton kaj ni devas esti dankemaj al iniciatoroj de propagando de tiu ĉi bela kaj facila internacia lingvo ĉe ni en Rumanio...". Li opiniis, ke Esperanto favoras al ekonomia progreso de nia patrujo kaj ni povos profiti baldaŭ!

Rilate al scienca agado de C. I. ISTRATI mallonge: li esploris la naturajn mineralajn riĉecojn de Rumanio (salo, petrolo, sukceso, ozokerito ktp.). Okaze de studado de halogenaj, benzenaj derivaĵoj, li eltrovis pli novajn kolorigilojn, la tiel nomata franceinon kaj li izolis unu novan kemian substancon, la friedelinon. C. I. ISTRATI estis aŭtoro de la lernolibro de kemio, titolita: "Elementa kurso de kemio" kiu aperis en 1891 j. kaj tiun tradukis ankaŭ en francan kaj hispanan lingvojn. Per sia verko: "Relativa studo de la ĝenerala nomenklaturado en la organika kemio (1913), li faris valoran kontribuon fiksi la sciencan nomenklaturon. C. I. ISTRATI estis reprezentanto de la naturista-sciencia materialismo kaj li defendis la sciencan opinion rilate al unueco de la materio. Li batalis kontraŭ la energetismo, fizika idealismo kaj agnostikismo en la naturaj sciencoj. C. I. ISTRATI disvolvis ankaŭ multflankan socian agadon enkadre de medicino, kulturo kaj scienco. Li fondis en 1890 j. la: "Rumanan Sciencan Societon" kaj en 1902 j. ankaŭ la "Rumanan Societon" por la disvastigo kaj progreso de la scienco. Lia vivo kaj agado estu ekzemplodona por ĉiuj scienculoj-esperantistoj en la nuna Rumanio!

D-ro LÁZÁR Gábor

ANONCOJ

S-ro Edmond LUDWIG, la redaktoro de revuo "La Domo", volonte aperigus artikolojn pri profesioj (prefere teknikaj). Do sendu artikolon pri via profesio, metio al TAKE ESPERANTO, 26 route de la Schlucht F-68140 STOSSWIHR, FRANCIO. Dum la kunlaboro, la verkanto ricevas senpage la revuon!

Al nia redakcio alvenis unu sola solvo de la enigmo, aperinta en la nr-o 2. Kiel promesite ni sendas la librojn "Alti paŝi ĉin Esperanto" kaj "Documente Esperanto" al s-ino JUHÁSZ Viola, VADU CRISULUI. Ni gratulas al ŝi!

NOVAĴOJ

Aperis la libro **DRAKULA** de Ioan SÂRBU. Krom la konciza biografio de Drakula, ĝi enhavas ankoraŭ dek novelojn tradukitajn el la rumanlingva literaturo.

Ĝi mendeblas ĉe Ioan SÂRBU, b-dul 15 Noiembrie 92, sc.C, ap.8, RO-2200 BRAȘOV, RUMANIO.

Verŝajne en aprilo-majo okazos Nacia Kongreso de REA. Samtempe ni organizos seminarion pri Esperanto. Ni invitas ĉiujn gesamideanojn el Rumanio partopreni ĝin. Certe ĉiu havas ion ĉini pri Esperanto **esperante!** Ĝis la 15-an de aprilo sendu la titolojn de via prelegoj kaj la daŭro de la prezentado (10-30 minutoj).

Por la membroj de REA, kiuj pagis la kotizon en la jaro 1997, ni pagos la vojaĝkoston (parte aŭ entute kaj oble ankaŭ la restadojn dum la Kongreso kaj seminario).

Ni prelegu, ni pridiskutu la Esperanto-agadon, ni unuiĝu!
Kontaktadreso: Aurora BUTE, Str.Orsova nr.1, Sc.A, Ap.9,1900, TIMIȘOARA

Se vi deziras korespondi esperante, trovi geamikojn tra la mondo, skribu al:

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

B.P.6, F-55000 Longeville-en-Barrois, Francio

En la revuo de la mezlernejo "Ion MINULESCU" en Slatina, titolita SIMBOL, aperis poemoj de Nikolajs KURZENS (letono) en Esperanto kaj ĝiaj tradukoj en la rumanan lingvon de NAGY I.

Esperanto Asocio en la Euregiono Mozo-Rejno

Ĉion ĉi la E-klubo de Lieĝo resumis en unuhora vidbendo, kun klarigoj en la Internacia Lingvo.

La 28-an de septembro 1997 kvindeko da esperantistoj partoprenis en la Trilanda Renkontiĝo de la asocio *Senlime*. Post kiam ili rigardis la filmon, ili mem vizitis la historian kernon de la urbo, kiun oni

plej bone povas vidi post grimrado de 372 ŝtupoj al la "Monto de Bueren". Ili ankaŭ admiris la kvietajn kaj kaŝitajn romantikajn kortojn, malnovajn konstruaĵojn kaj riĉajn endomajn dekoraciojn kaj meblaron. Samtempe kun la trilanda renkontiĝo okazis ĝenerala asembleo de la asocio *Senlime*. Ili klopodos reaktivigi la iaman Esperanto kunvenejon "Select" en Kelmis, la centro de la iama neŭtrala Moresnet, kie oni revis, antaŭ preskaŭ cent jaroj, krei la Esperanto-ŝtaton "Amikejo".

La venonta renkontiĝo okazos ja la 27-an kaj 28-an de junio 1998 en Dinant. el revuo FEN-X

Laŭ la statuto, en oktobro post sia aktiveco kiel prezidantino de Oradea Esperanto Asocio (du mandatoj), s-ino SZÜCS Irene transdonis la gvidadon al s-ino BARABÁS Zsuzsa. Dum sia aktivado de post 1990, ŝi instigis la reaktivadon de E-movado en Oradea. La rezultoj estas, ke aliĝis al E-kursoj 152 kursanoj, inter kiuj 97 trapasis la bazan kaj mezgradan ekzamenojn.

LEGENDO DE FLORO "NE-FORGESU-MIN"

Oni rakontas, ke post la apero de florigeroj kiuj komencis kreski, la Feino de la Floroj nomis ĉiujn per aparta distinga nomo, nur unu solan ŝi forgesis.

La floroj kiuj ricevis nomon estis tre kontentaj kaj gajaj, nur la sennoma estis trista kaj pensiga en valo apud iu rivereto, kun sia vizaĝo superversita de larmoj pro daŭra ploro.

Post iom da tempo la Feino de la Floroj promenante sur florplena kaj verda kampo, vidis ke floroj estas tiel gajaj kaj ĝojaj, ankaŭ ŝi ĝojis pri ili.

Dum sia promeno iom malproksime apud de rivereto, ŝi vidis floron, kiu per ploro montris amaran doloron. La Feino de la Floroj mirplene demandis ĝin:

-Kial vi staras ĉi tie kaj ploras, kaj ne ĝuas la gajecon, kiel viaj fratinoj?

-Kiel mi ne plorus kaj ne estus malgaja, se vi donis nomon al ĉiuj floroj, nur min vi forgesis? - respondis ĝemante la floro.

La Feino aŭdante tian respondon sentis kortuŝon pri la malfeliĉo de la floro. Ŝi komencis karesi ĝin, kaj milde diris al ĝi:

-Ĉesu, mia kara, ne plu ploru, ĉar baldaŭ ankaŭ vi havos nomon.

Dirinte tion la Feino reiris al la palaco, kie interkonsilis kun la aliaj feinoj. Vokis al ŝi la floretan, kaj diris:

-Vi ne forgesis min, ke mi ne nomis ankaŭ vin, kiel la aliajn fratinojn. Komence de nun via nomo estos Ne-forgesu-min.

Do, de tiam la bela floreto kun bluaj petaloj en multaj partoj de la mondo nomiĝas NE-FORGESU-MIN, kaj en esperanto Miozoto.

laŭ la rumanaj popolaj legendoj
de Eugenia Ecaterina POPOVICIU, ORADEA

OPINIOJ, KONSILOJ, KRITIKOJ, PROPONOJ

Mi dezirus ekscii, kion signifas ALOO.(...)

Mi dezirus plu ricevi ankaŭ fakajn E-revuojn, sed mi ne havas financon eblecon, apenaŭ mi povis sendi pm. por ĉijara abono de BAZARO. Mi pensas, ke estus bone, se ni esperantistaj handikapuloj aŭ tiuj, kiuj ne havas financajn rimedojn, havu helpfonduson. Mi pensas, ke ankaŭ estonte BAZARO ripozos sur nia labortablo. (...)

Mi tre multe bezonus havi radioricevilon, kiu helpu min en mia E-agado, per aŭskultado de radio elsendoj.(...) Petre GRUIANU

B-dul Unirii, Bl.24, Sc.B, Ap.24, 5100 BUZĂU, RUMÂNIO

Estimata sinjoro, responde je viaj petoj, ni diskonigas al vi kaj vian adreson, ke tiuj kiuj povas helpi vin povu fari tion, kaj en esperanto ni sendos senpage al vi BAZARON.

Aloo estas kreskaĵo nomita en rumana lingvo Aloa, kaj ĝi estas aĉetebla en preskaŭ ĉiuj apotekoj aŭ florvendejoj. La red.

Kutime la kritiko utilas, ĉar helpas pli profunde "tranigardi" ian aferon. SED la kritiko tute ne valoras, se oni ne proponas rimedon efikan. Do, estimataj gesamideanoj rumanaj, kritiku, sed ankaŭ proponu kaj precipe faru ion konkretan!(...)

La eksterlandanoj tute ne interesiĝas pri niaj laŭdoj, kritikoj, dankoj ktp.(...)

Ni devus diskonigi, pere de Esperanto, la rumanajn valorojn, tion, kio estas specifa de Rumanio. Ni iniciatu rubrikojn pri rumana literaturo, historio, geografio, scienco, muziko ktp. Gesamideanoj, samlandanoj, ĉu inter ni ne troviĝas instruistoj, kiuj povus liveri materialojn pri niaj granduloj kiel Eminescu, Blaga, Marin Sorescu, Sadoveanu, Enescu, Brâncuși ktp.? Ĉu neniu inter ni kapablas skribi la veran historion pri Drakula, pri kiu skribis kanadiano, vizitante

Rumanion? Ĉu ni nenion havas rakonti pri nia urbo, urbeto, kie ni loĝas? Kiom multe ni povus skribi pri Bukareŝto, Braŝovo, Maramureŝ, nia belega norda Moldavio, Nigra Maro! Serĉu, skribu, traduku materialon!

Aurora BUTE, TIMIȘOARA

Estimata sinjorino, ni estas dankemaj pro viaj konsiloj kaj ni ĝojas, ke finfine la Timișoara-anaj esperantistoj donis vivsignon!

Ni esperas, ke per la enhavo de la nuna numero, ni jam donis favoran respondon je viaj petoj. La red.

Ni dankas al niaj subtenantoj, kiuj laŭ siaj eblecoj helpis nin. Ni dankas al:

s-ro Hermann J. HORRDX, Germanio, kiu donacis 10 DM

s-ro Johano PACHTER, Germanio, kiu donacis 10 DM

mons. JAKUBINYI György, ĉefepiskopo de Transilvanio, kiu donacis 50.000 leojn

s-ino SZÜCS Irene, ORADEA, kiu donacis 25.000 leojn

MUNICIPA KULTURDOMO, ĉar ebligis al ni redakti la 4-an numeron de BAZARO.

BIHOR, LA LANDO DE VARMAJ AKVOJ

Turisto, kiu sidas ĉe la stirilo de aŭtomobilo, veturante laŭ la Eŭropa vojo E60 aŭ en unu el la komfortaj eksprestrajnoj, alvenas Oradea-n, la ĉefurbon de distrikto Bihor (la sepa urbo de Rumanio, laŭ la grandeco) kaj unuc kontaktas Rumanion kaj la gastaman karakteron de la rumanoj.

La beleco de la loko, la pitoreska pejzaĝo, la karstfenomenoj, raraj floroj, la historiaj kaj arkitekturaj monumentoj, la aŭtentika popolarto kaj folkloro, la reto de alirvojoj kaj precipe la abundo de varmaj mineralfontoj. La "blanka bolanta oro", fonto de la sano, faras la urbon Oradea kaj ĝian ĉirkaŭaĵon, ideala loko per feriado, studado kaj resaniĝo.

La zono de Bihor havas multforman amfiteatran reliefon, kiu ŝtupe altiĝas de 110m en okcidento, ĝis 1848m (Montaro Bihor) en la oriento. Supreniro de krutaj deklivoj rekompencas piedvaganton per la vasteco de glataj montpintoj. Vintrajn sportojn oni praktikas dum kvin aŭ ses monatoj jare.

Oradea situas je 1816 km for de Parizo, 1564 km distanco de Vieno aŭ 256 km de Budapeŝto. Ĝi situas sur el la zorge planitaj

ĉefvojoj de Rumanio, kiu transiras la landon de okcidento kondukante tra urboj Cluj-Napoca, Sibiu, Râmnicu-Vâlcea, Pitești al Bukareŝto (595km) la ĉefurbo de la lando.

Oradea estas bela urbo ĉe la rivero Crișul Repede. Ĝia historio de jarmiloj fontas el la neolitika epoko. Arĥeologoj trovis ilojn, keramikajojn kaj aliajn objektojn el kupro, oro kaj arĝento (ortrezoro el la fino de la bronzepoko estas unu el la plej riĉaj el Rumanio).

VIZITINDAJ LOKOJ

BAROKA PALACO la plej granda tiaspeca konstruaĵo en Rumanio (XVIII-a j.c.) enhavas la Provincan Muzeokomplekson (historio, arto, etnografio, natursciencoj).

URBODOMO estas monumenta konstruaĵo en novklasika stilo (komenco de la XX-a j.c.). La supraj etaĝoj estas ornamitaj per simbolistaj statuoj. Ĉiuhore, la turosonorilo aŭdigas muzikon el la marso de Avram Iancu (unu el la estroj de rumanoj dum la revolucio de 1848).

PALACO KAJ TRAIREJO DE LA "NIGRA AGLO" estas unu el la plej gravaj monumentoj de la secesionismo en Transilvanio (1907-1908). Ĝi monumenton plibeligas la Y-forma trairejo, kovrita per vitralo.

MEMORIGA DOMO ADY ENDRE hungara poeto kiu loĝis inter 1899 kaj 1904 en Oradea.

ORTODOKSA PREĜEJO KUN LUNO, historia monumento konstruita en la XVIII-a jarcento en baroka stilo. Ĝlombo kun trimetra diametro, duone nigra, duone ornamita, pendas sub la horloĝo. Ĝi montras la fazojn de la luno dum 28 tagoj.

ROMKATOLIKA PREĜEJO (BAZILIKO) konstruita en la XVIII-a jarcento, historia kaj arĥitektura monumento. Ĝi estas la plej granda baroka preĝejo en Rumanio.

FERIADO KAJ TERMOKURACADO EN REGIONO BIHOR

BANLOKO FELIX Kuraciloj en tiu mondfama kuracioko estas la varma mineralakvo (20-40 gradoj C), la marĉkoto kaj fosila sapropela koto, la klimato kaj U.V. sunradioj. Tre specialaj kurackvalitoj por multaj malsanoj: reŭmoida artrito, ankiloza spondilito, postakutaj artikaj reŭmatikaj statoj ktp..

BANLOKO 1 MAI situas je alteco 176m ĉe la aŭtovojo DN76, proksime de Banloko Felix kaj nur je 7 km for de Oradea en kverkarbaro, kiu donas al ĝi bonan klimaton. La loko estas fama pro la mirinda efikeco de la termala akvo kaj la fosila sapropela- kaj marĉkoto

formita en la PETA naturrezervejo, efika pro la kuracado de lokomotoraparataj kaj periferi-nervsistemaj malsanoj, haŭtmalsanoj kaj kelkaj digestmalsanoj.

KURACLOKO STĂNĂ DE VALE situigas 25 km orienten de la vojo DN76 ORADEA - BEIUȘ je la 1100m alteco en la Montaro Vlădeasa. Ĝi kuŝas sur la fundo de larĝa kaldrono ĉirkaŭita de koniferoj. Pedoklimataj kaj vegetaj faktoroj kaŭzas favoran atmosferon por kuracado de neŭrozo kaj Basedow malsanoj. Pro sia situo ĝi estas grava ekirloko por piedvagantoj irantaj al koro de Okcidentaj Karpatoj kaj ideala loko por la praktikantoj de vintraj sportoj.

BANLOKO TINCA (131m alteco) estas saniĝloko en la arbarzono apud la rivero Crișul Negru. Pro mineralakvoj kaj favora klimato taŭga por kuracado de malsanoj de la lokomotoraparato, periferia nervsistemo, digestaj kaj hepataj malsanoj.

SZÜCS Irene, Oradea

18 kilometrojn norde de Târgu Mureș (laŭ la Nacia Vojo 15), en la vilaĝo Gornești (ĉ. 7000 loĝantoj) troviĝas interesa baroka kastelo aparteninta al la familio Teleki. Ĝi estis konstruita (1771-1778) sur la loko de iama fortikaĵo kaj estas ĉirkaŭata de granda parko ornamita per statuoj de mitologiaj personoj. Interesaj estas kelkaj informoj pri la kastelo: ĝi havas 12 kamenojn, 52 ĉambrojn kaj 365 fenestrojn!

Ionel ONET, USONO

TRI SEMAJNOJ EN FRANCIO

Kiam mi komencis lerni Esperanton aŭtodidakte, en 1982, mi eĉ ne revis vojaĝi iam en okcidentan landon aŭ gastigi fremdlandanojn - la Ceaușescu-diktaturo ŝajnis daŭri eterne. Simple mi deziris korespondadi kun fremdlandanoj kaj legadi gazetojn - kiujn ne plenas de Ceaușescu-portretoj... En 1989 okazis la ŝanĝo kaj mi ricevis plurajn leterojn el Francio - ĉiuj samideanoj deziris helpi.

En 1990 francaj geedzoj pasigis semajnon ĉe ni, ni gastigis ilin en nia modesta apartamento, en blokdomo. En 1995 ili sendis al ni oficialan invitleteron kaj ofertis pagi ia vojaĝkostojn por mi kaj mia edzo. Fine de junio ni trapasis la limon de Aŭstrio per aŭtobuso, ni traveturis Germanion kaj atingis Strasbourgon. Nia amiko tie atendis nin kaj per sia aŭtomobilo veturigis nin en sian loĝlokon. Ĝi situas en Vogezoj, en tre bela montara, arbara regiono. Nia unua deziro estis baniĝi kaj dormi post la tutnokta vojaĝo, poste ni vizitis proksimajn urbojn, kiel Epinal, Gerardmer, Remiremont, nin invitis amikaj familioj

de nia amiko kaj en la 14-an de julio, nacia tago de Francio, kune ni admiris vespere la belegan festotagan artfajraĵon, ĉe la lago de Gerardmer. Kune kun geamikoj de nia animo ni vizitis la plej malnovan vitro-fabron de la lando, kie oni fabrikas belajn objektojn per tradiciaj metodoj. Niaj geamikoj veturigis nin ankaŭ ĝis la Mediteraneo. Ni pasigis semajnon en Le Lavandou, sur la bordo de la Mediterana maro, nomata franclingve Cote d'Azur. Vere, la akvo havis tian lazuran koloron, ni vidis eĉ velŝipon majeste naĝantan, ŝajnis al mi sonĝo, ne realo. Ni promenadis en la marborda urbeto Bormes les Mimosas, admiris la historiajn konstruaĵojn, mezepokajn stratojn. La vetero estis ĉiam bela, varmega, sur la arboj kantis de matene ĝis vespere la t.n. "cigale'-oj (mi ne konas la E-nomon de tiu insekto) - ja ni estis en Provence. Ni vizitis galerion de pentristo Stricher Clement, ni ricevis donace tri belajn reproduktaĵojn, kiuj nun ornamas nian ĉambron kaj memorigas nin pri Bormes les Mimosas kaj la lazura maro.

Antaŭ ol reveni en Rumanion, ni promenadis en la fama urbo Strasbourg kaj en kelkaj ĉarmaj mezepokaj urbetoj - Riquewihr, Turckheim ktp. Eble iuj legantoj miros leginte nomojn kiel Turckheim, Eguisheim, Kayserberg, Wintzenheim, Markstein, Hohwald, Erstein ktp. Ja ili estas germanaj nomoj... ĉu ne temas pri Francio? Ankaŭ ni vizitantoj el Transilvanio, miregis. Ĉu ni estas en Francio? Kie estas la franclingvaj nomoj? Ni kapturniĝis dekstren kaj maldekstren survoje, serĉante la franclingvajn nomojn de tiuj lokoj. Nenie. Videble oni ne tradukis francan tiujn germanevenajn nomojn. Kaj pro tio la gloro de la granda Francio tute ne malgrandiĝis, eĉ male! Ni admiris ĝin eĉ pli multe kaj admiras daŭre, kiam en nia Transilvanio iuj volas neniigi la hungarajn nomojn de la urboj kaj vilaĝoj, iuj ne kapablas toleri la hungarlingvan tabulon apud la rumanlingva. Estas io neimagebla por ili, ke urboj, vilaĝoj povas havi ne nur rumanan nomon, ili luktas kontraŭ la dulingvaj tabuloj kaj diras: "Nenie ekzistas dulingvaj tabuletoj, kiajn la hungaroj en Rumanio postulas". Vere, en Alzaco ni ne vidis dulingvajn tabulojn... Kiu ne kredas, rigardu atente la mapon de Francio ĉirkaŭ Strasbourg.

Multan belecon mi vidis en Francio, sed plej multe min impresis la neimagebla afableco de la homoj. Ne nur niaj esperantistaj amikoj estis tiaj, sed ĉiuj, kiujn ni ekkonis pere de ili.

Mi ne parolas france, nur mia edzo parolas iomete, sed nia franca amiko estis elstara interpretisto kaj la konversacio flue realiĝis. Kiam niaj geamikoj, kiuj gastigis nin, pro ĝentileco parolis esperante eĉ inter si, mi diris: Ne ĝenu vin, parolu france, mi ŝatas aŭskulti la

francan. Kvankam ne estis nekompreneo, mi tamen bedaŭris, ke mi ne lernis la francan lingvon en la lernejo, mi tre ekamis la francan popolon kaj mi estus feliĉa, se mi konus ilian lingvon belsonan. Sidante ĉe la tablo, antaŭ ol trinki, ofte mi aŭdis la toaston: "Vive la Roumanie!". Kaj mi tutkore respondis: "Vive la France!"

SZÁSZ Lenke, PRAID

KASTELO BRAN KAJ VLAD DRAKULA

En la pasinta aŭgusto mi vizitis la urbon Braşov en sudorienta Transilvanio. Tiu urbo, fondita en mezepoko de germanoj kaj tiam nomita "Kronstadt", estas hodiaŭ grava industria urbo. Ĝi troviĝas en la alta ebenajo ĉe la rando de la Montaro Karpatoj.

Nia gastiganto, Constantin Marcu, montris al ni diversajn vidindaĵojn, kaj inter ili estis la Kastelo Bran kiu situas en apuda vilaĝo, Bran. Oni diras, ke ĝi estas "kastelo de Dracula" (prononcu: drakula). Tamen, oni povus preskaŭ diveni de tiu nomo, ke oni uzas ĝin nur por kapti la atenton de turistoj de la okcidento. En Rumanio la kutima nomo de drakula (aŭ Vlad Drakula) estas "Vlad Ťepeş" (pron.: Cepeş). La vorto "ţepeş" signifas "palisumisto" kaj memorigas ĉiujn pri unu el la plej kruelaj monstroj en la historio. Tamen, ŝajnas ke la ligo inter Dracula kaj la kastelo estas iom malforta.

La Ordeno de la Teutonaj Kavaliroj fondis la kastelĉon, tiam nomita Dietrichstein, en la jaro 1212. La kastelo estas ĉe unu ekstremaĵo de montara pasejo al Valaĥio kaj tre proksima al la landlimo inter la princlandoj de Transilvanio kaj Valaĥio. La kavaliroj kiuj loĝis en la kastelo devigis la komercistojn, kiuj portis varojn tra la pasejo, pagi impostojn. En la turoj de la kastelo estas ĉeffenestraj sidlokoj de kie la rigardantoj povis senĉese observi, ĉu iu venas tra la pasejo. Mi povas imagi, ke la distingo inter la kavaliroj kiuj pagigis impostojn kaj rabistoj kiuj devigas pagi tributon ne ĉiam estis preciza en tiu sovaĝa epoko. Je la fino de la XIII. jarcento oni donis la kastelon al la lokaj germanoj por la protektado de la urbo Kronstadt (nuntempe Braşov).

La kastelo, impona sur monteto kaj kun altaj kaj dikaj muroj, estis bone konstruita por defendo kontraŭ malamikaj soldatoj kaj sieĝoj. Ankaŭ en la puto (supozeble super la akvonivelo) estas unu ekstremaĵo de sekreta tunelo tra kiu la sieĝitaj kavaliroj povus eskapi en bezonkazo. Mi legis pri aliaj kasteloj en Rumanio kiuj havas similajn tiuceiajn tunelojn.

Vlad Dracul, la patro, kaj Vlad Dracula, la filo, estis princoj de la princlando Valaĥio inter la jaroj 1436 kaj 1477, sed ne seninterrompe. Valaĥio estis vasala ŝtato (aŭ eble aliancano) de Hungario kiel estis ankaŭ Transilvanio. Sed en la rapida sangigo tien kaj reen de aliancoj kaj lojalecoj, instigita de avaro, timo kaj la ŝancokazoj de preskaŭ senĉesaj militoj, Valaĥio alterne pagis tributon al kaj batalis kontraŭ la turkoj. Vlad Dracula naskiĝis en Transilvanio, Loĝis tie de tempo al tempo, eĉ rifuĝis tien, kiam oni forpelis lin el Valaĥio, sed fakte li neniam estis reganto de Transilvanio, krom de du duklandoj (Făgăraș kaj Almaș) kiuj situis en Transilvanio, sed estis iel parto de Valaĥio.

Kvankam Dracula estas la plej malsankta homo imagebla, li fakte ne trinkis santon. Tiu parto de la makabra legendo devenas el hororoj kiuj okazis post cent jaroj kaj en alia lando. Estis hungara grafo, BATHORY Erzsébet, kiu kredis ke ŝi povas resti por ĉiam juna se ŝi banus sin en la sango de junaj virinoj. Oni diras ke ŝi tiucele mortigis 650 junulinojn.

Oni povus imagi, ke la vorto "Dracul" devenas de la latina vorto por drako (draco) kaj tio fakte veras. La patro kaj poste la filo estis membroj de la kontraŭ turka Ordeno de la Drako, kaj ambaŭ uzis la titolon en la subskribo (ekz.: "Wladislaus Dragwlya"). Tamen al la komparanoj la vorto "drac" havis ankaŭ la signifon "diablo", kaj mi opinias ke la malfeliĉa popolo tiel uzis la kromnomon. La kialo por la dua signifo de la rumana vorto devenas de la rakonto pri Sankta Georgo kaj la drako; oni imagis ke la kuraĝa sanktulo mortigis simbole ne drakon sed diablon. Do, la kutima traduko de la rumana radikoj "drac" estas "diablo".

La finaĵo "-ul" en la rumana estas simple "la". Do, "dracul" estas "la diablo". La plua finaĵo "a", kvankam ina finaĵo en la rumana, estis ankaŭ, laŭ Florescu kaj McNally, diminutiva sufikso. Do "dracula" signifas "filo de la diablo".

Mi ĉiam opiniis, ke Vlad Dracula devis esti unu el la plej teruraj kaj mallaŭdindaj homoj en la homa historio, Ĉar li multe mortigis, palisumis kaj torturis kaj turkojn kaj samlandanojn. Mi opinias, ke li estis psihopato, ĉar li murdis kaprice kaj ŝajne ĝuis vidi la suferadon de siaj viktimoj. Multe surprizis min renkonti tute alian vidpunkton inter multaj rumanoj. Unue, ili memorigis min, ke en tiu epoko estis multe da torturado en la mondo: en Turkio, en Hispanio, en Francio kaj aliloke. Ankaŭ, ili diras, ke Dracula mortigis plejparte ŝtelistojn, bojarojn (= nobelojn kaj riĉulojn) kiuj misuzis sian povon kaj sendube malamikojn kiuj minacis lian princorajton. Ili diras, ke en tiu "ora epoko" ĉiuj homoj estis

honestaj, feliĉaj kaj liberaj de troa impostado; kaj ankaŭ, li kuraĝe kaj sukcese batalis kontraŭ la timegigantaj turkoj.

La veraj kasteloj de Dracula estis en la urbo Târgoviște, kiu estis tiam la ĉefurbo de Valahio, kaj en Poenari, ĉe la rivero Argeș, ambaŭ sude de Transilvanio. Kiel modelo por sia romano "Dracula" la angla-irlanda aŭtoro, Bram Stoker, uzis alian kastelon kiu troviĝas ĉe la Pasejo Bârgău (aŭ Borgo) inter norda Transilvanio kaj Moldavio. Vlad Dracula multe vojaĝis tra kaj trans Transilvanio, kaj tute eblas, ke li tranoktis de tempo al tempo en la Kastelo Bârgău kaj en la Kastelo Bran. En junio 1456 li kondukis armeon de Transilvanio en Valahion (por regajni sian tronon) tra la pasejo kiu komenciĝas ĉe Bran, kaj oni povas kredi, ke almenaŭ tiam li restis aŭ tranoktis en la ticia kastelo.

el revuo INTERNI, de Steĉjo, KANADO

ARANĜOJ EN ESPERANTUJO

5-a MARA INTERNACIA RENKONTIĜO DE KEJA (MIRO)

21-25 julio 1998, SAVUDRIJA, KROATIO

Partoprenkotizo: 110 DM - ĝis la 30 aprilo 1998

130 DM - poste

La partoprenkotizo inkluzivas loĝadon en 4-6 litaj dometoj en kampo apud maro, manĝadon kaj programon. Ne eblas esti memzorganto.

Aliĝu al: Ivan MUNIC, ĉe KEJA, Amruŝeva 5/1, HR-10000 ZAGREB, KROATIO aŭ rete ĉe: ivan.munic@alpha1.fsb.hr

54-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

25 julio - 1 aŭgusto 1998, RIJEKA, KROATIO

Partoprenkotizo:

aĝo	ĝis 30 aprilo 1998	poste
<19 jaroj	230 DM	250 DM
19-26 jaroj	260 DM	290 DM
>26	310 DM	340 DM

Memzorgantoj pagas 50 DEM.

Aliĝu al: Vladimir KAMENSKI ĉe KEJA, Amruŝeva 5/1, Hr-10000 ZAGREB, KROATIO, aŭ rete ĉe: kamenski@cirtus.dhz.hr

26-a INTERNACIA RENKONTO NATURAMIKA (IREN)

25-31 julio 1998, PÉCS, HUNGARIO

Partoprenkotizo: 16000 HUF au 140DM - ĝis 30-an de aprilo 1998

17500 HUF au 150 DM - poste

La partoprenkotizo inkluzivas 6 tranoktojn, tage 3-fojan manĝadon kaj programerojn.

Aliĝu al: Esperanto Asocio, H-7601, PÉCS, Pf. 98, HUNGARIO,
Tel. +36-72-333123, 253751

13-a EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO

25 julio - 1 aŭgusto 1998, NANTES (REZE), FRANCIO

Partoprenkotizo: 800 FRF

Aliĝu al Philippe COUSON, 26 rue de Pre Ventenet, F-86340,
Nouaille-Maupertuis, FRANCIO, aŭ rete: diaregno@altern.com

2-a JUNULARA EKUMENA ESPERANTO TENDARO (JET 1998)

10-16 aŭgusto 1998, TAIZE, FRANCIO

Partoprenkotizo: malpli ol 30DM

La partoprenantoj el Rumanio ricevos 300 DM subvencion por la vojaĝo. Kondiĉo estas, ke ili antaŭe pruvu, ke ili lernis Esperanton. Tio devas okazi per persona Esperanta letero aŭ per atesto de la grup-estro aŭ de kurs-gvidanto, ke la aliĝanto vere lernis tiom da Esperanto, ke li povos sekvi legadon de bibliaj tekstoj kaj de Taize-teksto.

Aliĝu al: pastro Bernhâr EICHKORN, Romäusring 20, VS-VILLINGEN, D-78050, GERMANIO

RECEPTOJ

KUKO KUN MIELO

1) Ingrediencoj: 500gr. faruno, 60gr. polvosukero, iom da amoniako, 4 kuleroj da fluidigita mielo, 4 kuleroj da kremo kaj du ovojn.

Ni ĉion pastigu per miksilo. dividu la paston en 4 partojn, etendu kaj baku ilin. Kiam ili estas bakitaj, lasu ilin malvarmiĝi, smirkovru ĉiujn per la jena preparajo:

2) Ingrediencoj: 4 dl. da lakto, 3 ovoflavoj, 3 kuleroj da polvosukero, 3 kuleroj da faruno, ŝaŭmo el 3 ovojn.

Miksu la ovoflavon kun sukero, aldonu la farunon kaj malmulton da lakto. La ceteran lakton boligu, miksu ĝin kun la aliaj ĝis ĉio densiĝas, kaj aldonu la ŝaŭmon de ovoblanko. Kiam ĉio malvarmiĝis, aldonu ankaŭ 200 gr. da butero kaj 150 gr. da polvosukero kun vanilio.

Sur la lastan parton superŝutu per vanilia pulversukero.

Eugenia-Ecaterina POPOVICIU, ORADEA

ANTAŬ CENT JAROJ...

D-ro Ludoviko ZAMENHOF, la kreinto de mondlingvo Esperanto sendis la sekvan leteron el Ruslando por BARABÁS Ábel, redaktoro de la unua Esperanto-lernolibro por hungaroj, kunlaboranto de ĵurnalo "Ellenzék" en Kolozsvár (Cluj).

"Varsovio, 25. Marto 1898.

KARA SINJORO!

Mi ricevis vian leteron kaj ankaŭ la du ekzemplerojn de via hungara lernolibro de Esperanto, por kiuj mi kore dankas. Vian leteron mi legis kun granda plezuro kaj vian bonegan libron mi salutas kun ĝojo, kiel komencon de nia afero en via lando. Estas al mi tre agrabla vidi, ke nia afero trovis en Via estimata persono tiel varman kaj energian laboranton; mi esperas, ke la bela Hungarujo baldaŭ okupos unu el la plej honoraj lokoj en la historio de nia afero kaj ĝi baldaŭ povos servi kiel belega kaj imitinda ekzemplo por la aliaj landoj. Al viaj laboroj mi deziras la plej bonajn sukcesojn. La aranĝo de via libro estas bonega; la libro enhavas ĉion, kio estas necesa por la fundamenta ellerno de nia lingvo.

Mi petas Vin kore, volu skribadi de tempo al tempo al mi (kaj ankaŭ al la redakcioj de niaj gazetoj "Lingvo Internacia", "L'Esperantiste") pri la irado de nia afero en via lando. Volu peni, ke la "Adresaro de Esperantistoj" baldaŭ enhavu multajn nomojn el via lando.

Kun plej kora saluto

L. ZAMENHOF"

Kio estas Pasporta Servo?

Pasporta Servo estas gastiga reto, kiu nun konsistas el proksimume 800 gastigantoj en pli ol 65 landoj ĉirkaŭ la globo. Por aliĝi kiel gasto, sufiĉas aĉeti la liston, kiu estas jare aktualigata. Ek de tiam vi povas uzi la servon. Ĉiu gastiganto indikis kelkajn kondiĉojn, kiel ekzemple la nombron da gastoj aŭ tagoj, aŭ antaŭa sciigo. Gastigantoj ne petos monon, multaj eĉ proponos al vi matenmanĝon aŭ bongustan vespermanĝon, sed se vi venas tutan semajnon kvarope, vi komprenos ke kelkaj petos malgrandan kontribuon. La prezo de la listo kovras niajn administrajn kostojn.

Se vi estas gastiganto, vi ricevas senpage la liston!

Se vi deziras fariĝi gastiganto, skribu al jena adreso, petante la aliĝilon al la gastiganta reto:


*Pasporta Servo de TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
ROTTERDAM, NEDERLANDO*

La redakcio ne respondecas pro la artikoloj skribitaj de niaj kunlaborantoj, kaj ili ne nepre reflektas la opinion de la redakcio. Ni ne resendus la manuskriptojn, nur se vi nepre petas tion!

ASOCIO de ESPERANTO
C.P. 1111
RO-3400 CLUJ-NAPOCA
RUMANIO



IMPRIMATE



al PAPP TIBOR

TROMBITA'S M. 12.

HOZI DEBRECEEN

UNGARIA